# LA TAŬRA VOĈO

**Kongresa Kuriero de la 108a Universala Kongreso**

**Vendredon, la 4an de Aŭgusto 2023** **Numero 6**


## PROGRAMO

### Esperantologia konferenco

La ĉefa temo de la Esperantologia konferenco estas ĉi-foje la universitata instruado de esperantologio kaj interlingvistiko. La temon superrigarde prezentis Ilona Koutny, prof. de la Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU), en Poznano, Pollando. Poste ŝi koncentriĝis al la novaj kaj unikaj magistraj studoj pri interlingvistiko en AMU kiuj kombinas esperantologiajn studojn kun lingvistikaj (en esperanto) kaj informadikaj konoj (en la angla), tiel donos uzeblan diplomon al studentoj, junaj esperantistoj.
Interesiĝantoj trovas informojn:
http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/magistraj_-maj23_alvoko.html kaj https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/
Aliĝo ĝis la 25a de aúgusto: https://rekrutacja.amu.edu.pl/en/studies-cataloge/linguistics-and-information-management-specialty-interlinguistics,562
Varbfilmeto: https://www.youtube.c/watch?v=m-MpZ-xrNdwk&t=4s
Intervjuo kun IK: https://pola-retradio.org/2023/07/e_elsendo-el-la-15-07-2023/ ek de 17.17 min.
Instruista trejnado: https://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/INSTR_TREJN_2023_anonco.html kaj https://edukado.net/novajhoj?id=888
Informis Ilona Koutny (interlin@amu.edu.pl)

### Maratona scienca programo kaj dramo en IKU

Kadre de la Internacia Kongresa Universitato okazis ĵaŭde rekorda nombro de naŭ prelegoj samtage, ĉiuj estis hibridaj kaj anoncitaj ankaŭ en Eventa Servo. Kvin de la Scienca Kafejo: La Memoro (Butan), Mondregeco (Dawson), La unuaj E-vortaroj (Eckert), La danĝera lumo (Fontaie), Kalkuliloj (Lo Jacomo), kaj sekve kvar IKU-prelegoj pri variaj temoj: Reguleco kaj nereguleco en la homa lingvo (Grant Goodall) kaj la daŭrigaj IKU-AIS prelegoj pri Kvantuma interplektiteco: la mistera kvantuma gluo de Jesper Jacobsen, La kikonga lingvaro de Heidi Goes kaj Lingva Pejzaĵo de Gabriel Labrie. Ĉiujn prelegojn oni povis sekvi tra eventoaservo.org. En la prelegoj de Jacobsen kaj Labrie okazis AIS-ekzamenoj en kiuj partoprenis sukcese 10 kaj 6 el la aŭskultantoj, respektive. Ili ricevos siajn AIS-atestilojn publike dum la Scienca Forumo, Vendredon 14:15-15:15. Drama momento okazis en la marda IKU-prelego de prof. Vera Barandovska-Frank: mallonge antaŭ sia prelego ŝi rompis la manon kaj tamen insistis liveri la prelegon malgraŭ fortaj doloroj. Tuj post la prelego ŝi estis urĝe portita al la hospitalo, kie ŝi ricevis gipsan memoraĵon el Torino.

*Amri Wandel - UEA-vicprezidanto*



La Redaktoro de la Kuriero dankas ĉiujn kiuj kontribuis plenigi la bultenon per siaj raportoj kaj fotoj. Bedaŭrinde ne ĉiam estis spaco por enmeti la fotojn akompanantajn la artikolojn, ĉefe kiam venis multaj kontribuoj. Morgaŭ mi planas enmeti multajn fotojn dokumentantajn la pasintajn tagojn (ne devus veni multaj raportoj, mi supozas).
Mi esperas ke vi almenaŭ iomete ŝatis ĝin kaj ke vi pardonos eventualajn miajn erarojn (preskaŭ ĉiam mi kompletigis ĝin malfrunokte).
Nu, dankon kaj ĝis la revido,

*Pier Luigi Cinquantini KN 255*

### La oficiala akcepto de la prezidantoj de LKK kaj UEA ĉe la Urbodomo



## Novaj libroj lanĉitaj dum UK

Dum la ĵusa Universala Kongreso estis lanĉitaj pluraj novaj eldonaĵoj de diversaj eldonejoj, kiujn eblas rekte ankaŭ aĉeti kaj plurajn el ili rekte la aŭtoroj, tradukistoj aŭ la eldonistoj mem prezentis/ prezentos.
- Certe ne maltrafu la imponan verkon, eldonitan de EAB: "**Unu animo homa**" - temas pri la kompleta verkaro de Marjorie Boulton, kun 1212 paĝoj! (inkluzive de neniam publikigitaj poemoj, manuskriptoj). Nemalhavebla titolo (en 2 volumoj!) por ĉiu poem-ŝatanto.
- Ankoraŭ unu titolo, ligita kun LA poetino: marde Humphrey Tonkin dum la UK prelegis elstare pri la vivo kaj verkaro de unu el la plej grandiozaj poetoj en Esperanto, Marjorie Boulton. Alproksimiĝinte al la fino de la prelego, li menciis ilian korespondadon pri unu el ŝiaj projektoj, kiujn ŝi neniam finis. Temas pri **Koriolano**, unu el la tragedioj de William Shakespeare. Edmund Grimley Evans trovis la finotaĵon inter ŝiaj postlasaĵoj, kaj Humphrey poste ĝin kompletigis kaj plibonigis. Mardon do Esperanto-Asocio de Britio lanĉis tiun ĉi novan libron, kiu enhavas ankaŭ enkondukajn eseojn verkitajn de Humphrey. La libro (kune kun la aliaj de EAB) aĉeteblas en la butiko maldekstre, antaŭ la libroservo.
- Plia nemaltrafebla eldonaĵo de EAB certe estas la Esperanto-versio de la komikso: "**Doktoro Esperanto kaj la lingvo de espero**".
Pluraj novaj titoloj (precize kvin) estis prezentitaj ankaŭ de la eldonejo Espero (www.espero.sk/eo) - kaj du el ili estis ankaŭ prezentitaj ene de la Aŭtoraj duonhoroj pere de la aŭtoro mem (Hju Rid - **Kuprokranio/Silverskull**) aŭ la tradukinto (István Ertl - **Pri la eta talpo, kiu volis scii kiu faris tion sur lian kapon**).
Jen ĉiuj kvin novaj titoloj, kiuj troviĝas en la sekcio "Novaĵoj" en la libroservo de la 108-a UK:
- **Kuprokranio/Silverskull**
Dulingva, Esperanto-angla kolekto de rimarkindaj kaj pensigaj sci-fi rakontoj de skota aŭtoro Hju Rid en la ĝenro "kiberpunko" (*cyberpunk*).
Temas pri la daŭrigo (dua parto) de la libro "**La Tago de Kiborgiĝo**", tamen legeblas ankaŭ plene sendepende.
La rakontoj evoluiĝas kaj moviĝas en tempo, kiel estas priskribita ankaŭ evoluo de unuopaj teknologioj. Danke al dulingveco de la libro (tekstoj estas skribitaj spegule sur la paĝoj unu kontraŭ la alia), ĝi estas taŭga por lerni aŭ pliperfektiĝi en unu el la lingvoj (aŭ en ambaŭ). Aŭtoro (de ambaŭ lingvaj versioj): Hju Rid
- **Pri la eta talpo, kiu volis scii kiu faris tion sur lian kapon**
Ĉu io povas esti pli ĝena en la vivo ol ne scii, kiu fekis sur vian kapon? Apenaŭ. Ne mirinde, ke la eta talpo komencas detektivan esploron por solvi la densan misteron. Ĉu ĝi sukcesos? Eksciu per la ekscita teksto de Werner Holzwarth, bunte brunaj bildoj de Wolf Erlbruch, per esperantigo de la fek... unda tradukisto István Ertl.
- **Granda Esperanta-Slovaka Vortaro / Veľký esperantsko-slovenský slovník**
La plej aktuala, nova esperanto-slovaka vortaro. Post 53 jaroj, reaperas la preskriba vortaro, origine bazita sur la Esperanto-ĉeĥa vortaro de M.Malovec. Redaktoro: Stanislav Košecký, Aŭtoroj: Miroslav Malovec, Ľubomír Fajth kaj kol.
- **Scienco kaj tekniko kiel rimedoj por efektivigi daŭripovan evoluon**
La prelegkolekto de la faka evento Reta KAEST 2020 (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko). La kolekto enhavas kontribuojn en du kategorioj: ĉeftemaj (13 prelegoj) kaj alitemaj (15 prelegoj). Aldonaj 4 "fulmprelegoj". Ĝis nun la plej dika kompilo, kun plej multaj kontribuoj. Kolektivo de aŭtoroj.
- **Detala Gramatiko de Esperanto**
Se "PMEG" estas tro p(r)eza, por vi, tiu ĉi nova gramatiko estas (preskaŭ) same detala kaj utila. Temas pri jam tria, plibonigita eldono.
La Detala Gramatiko de Esperanto estas mallongigita versio de la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG), bazita sur la eldono el 2023 (PMEG 2023). Ĝi enhavas la plej esencajn klarigojn pri la gramatiko, vortfarado, skribo kaj elparolo de la Internacia Lingvo, sed ne estas same kompleta kiel PMEG. Ĝia celgrupo estas precipe komencantoj, vojaĝantoj kaj partoprenantoj en kursoj. Ĝi uzas - same kiel la antaŭ eldonoj - tradiciajn gramatikajn terminojn. Sekve anstataŭ la PMEG-aj terminoj O-vorto, rolvorteto, perverba priskribo k.t.p., aperas ĉi tie la tradiciaj terminoj substantivo, prepozicio, predikativo k.t.p.
La Detala Gramatiko de Esperanto tamen donas bonan kaj relative profundan superrigardon de la lingvo en teksto apenaŭ trione tiel longa kiel tiu de PMEG, kiu estas tutampleksa, detalega referenco-verko. La eldonon de tiu ĉi gramatiko subtenis Esperantic Studies Foundation (Fondaĵo por Esperantaj Studoj, ESF).
Aŭtoro: Bertilo Wennergren
Nepre do vizitu la libroservon, por riĉigi vian kolekton de la Esperanto-libroj, eventuale aĉeti taŭgan donacon al viaj EO-amikoj, kiuj ne povis mem veni al Torino.

## ANONCOJ

### Aŭtobusoj al Lignano

**[ILEI- kaj TEJO-Kongresoj]**

Bonvolu atingi la aŭtobusojn kun ĉiuj viaj pakaĵoj sabaton post la fermo, inter la 13-a kaj la 13-a kaj duono, antaŭ la enirejo de la kongresejo, en la alia flanko de la strato apud la monumento al itala soldato, oficiale "Monumento al Fante d'Italia". Estu akurataj ĉar la aŭtobusoj foriros je la 13-a kaj duono.

### Montrealo donacas por la aŭkcio

La Montreala LKK donacas por la aŭkcio de la Torina UK erojn aparte valorajn por kolektantoj! 1) la kongresa sako (limigita eldono!) kaj 2) la aro da kongresaj poŝtkartoj kaj kolekteblaĵoj – estas po tri diversaj specoj de poŝtkartoj (do, entute ses). Sur unu el ili estas algluita la fama poŝtmarko de la UK 2020, kiu ne okazis pro KOVIM. Tiu ĉielarka poŝtmarko estas vera raraĵo -- mane desegnita de la sekretario de la montreala LKK (kaj la aŭtorino de la teatraĵo "1910", kiu premieris en Montrealo) – restas nur kelkaj ekzempleroj de ĝi en la tuta mondo. Sur la karto de 2020 estas subskriboj de la tuta Montreala LKK. Aldone, estas areto da tatuoj, same de la UK 2020, kiu ne okazis. Laste sed ne balaste, estos belega insigno kun la simbolo de la Montreala UK. Se vi ne partoprenis, jen via ŝanco tamen travivi iomete la pasintjaran UK-on!

### Vortoj - la moviga kaj noviga ludo ludeblas en la kongresejo

Venu praktiki Esperanton (aŭ eĉ aliajn lingvojn) kaj samtempe saltadi sur la danctapiŝo. Speciala nova kaj noviga ludo, kiu kombinas lingvo-lernadon kun moviĝo prezentiĝas ĉi-kongrese! La ludo estas senpaga, subtenita de la Eŭropa Unio. Venu testi ĝin kaj testi vin!

Ludeblos ankoraŭ vendredon de la 9:00 ĝis la 12:00 kaj de la 13:00 ĝis la 16:00

En la koridoro maldekstra (survoje al bufedo Vittoria), iom antaŭ la salono Hodler)

PS: Se vi emus helpi traduki la ludon ankaŭ al via lingvo, volonte kontaktu la kreantojn. Eblas facile aldoni pliajn lingvojn kaj tiel eĉ pli multlingvigi la proponon! (Same eblas ankaŭ helpi aldoni pliajn/aliajn vorto-kategoriojn, por povi ludi eĉ pli multe kaj amuze). Se vi do emus kunlabori pri la projekto, bv. kontakti: info@ikso.net aŭ rekte la prezentantojn surloke.

## PROGRAMŜANĜO

La ateliero pri Origamio, de la 12h15, ne okazos ĉe la salono Grattapaglia, sed en la Korto Bourlot, je la sama horo.

### Kunlaboro de la Vicprezidanto dum la urbestra akcepto



La prezidanto de UEA prezentas al la vicurbestro de Torino la donacitajn librojn, dum vicprezidanto Amri Wandel asistas tenate la mikrofonon.

### Raporto pri la kunveno de AVE

Asocio de Verduloj Esperantistaj, AVE, renkontiĝis je la 1a de Aŭgusto. La sekretario Manfred Westermayer prezentis la 3-flankan agadon de AVE: Informi Verdulajn Partiojn ke Esperanto taŭgas por politika laboro - aparte ene de la franca EELV* - kion ni montras tradukante iliajn dokumentojn; ekzemple la Ĉarton de la Tutmondaj Verdulaj Partioj, kiun ili prezentas sur ilia retejo: Globalgreens.org - AVE prezentis Esperanton dum ilia kongreso dum Junio en Incheon, Koreio, danke al membroj de KEA. Aliflanke AVE informas la samideanojn pri la politika programo de tiaj partioj. Krome ni agadas reale subtenante per informoj kaj financoj projektojn de samideanoj, ĉefe en Tanzanio, Burundo kaj D.R. Kongo - temas pri salubra trinkakvo, lernejoj, edukado super la bazaj lernejoj, kaj pri ekologia agrikulturo. Detalojn pri tio vi vidas en nia retejo: verduloj.org

*) Michael Leibman kiu estras la "Komisionon pri Esperanto kaj Lingvoj" de la franca Verdula Partio (Europe Ecologie les Verts) parolis pri dokumento prezentita al la programa instanco de EELV, substrekante la taŭgecon de Esperanto por ampleksigi komunan kulturon kaj senton de aparteneco kaj solidareco de eŭropanoj kadre de EU.

*Manfred Westermayer KN 461*

### Pola Kongreso

Kongreso estos somere 2024 jare en Kalisz kiu troviĝas meze de Pollando inter Poznań kaj Wrocław. Ĝi havas 100 mil loĝantojn. Jam Ptolemeo donis signon Calisia sur sia mapo de jaro 160. Estas preparita riĉa programo de artistoj kaj ekskursoj. Se vi intencas partopreni donu al mi vian KN kaj baldaŭ mi sendos invitilon kaj informon.

*Świętosław Fortuna KN 758*

## PROGRAMO

### Speciala gasto ĉe la kunveno de ATEO

Ĉe la publika kunveno de ATEO (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo) vendredon matene estos tre interesa gasto. Luigi Garlaschelli estas sciencisto, kiu esploras miraklojn por malkovri, ĉu vere temas pri mirakloj aŭ ĉu eblas klarigi ilin per sciencaj metodoj.
Li estas la homo, kiu mem refaris la faman Mortotukon de Torino, kaj dum la vendreda kunveno de ATEO li klarigos, kiel li faris tion. Cetere, li estas ne nur sciencisto sed ankaŭ esperantisto.
Venu amase al la publika kunveno de ATEO en salono Grattapaglia, vendredon 10.45 ĝis 12.15. Ĉiuj estas invitataj, ne nur ateistoj kaj membroj de ATEO!

*Anna Lowenstein KN 219*

### Raporto pri kunsido de EDE

Mardon la 1an de aŭgusto estis kunsido de/pri Eŭropo Demokratio Esperanto en salono Grattapaglia. Ĉeestis proksimume 30 homoj.
Pierre Dieumegard, prezidanto de la franca asocio EDE, unue prelegis per lumbildoj pri la nuna stato de EDE, la agado kiel politika partio en Francio kaj kiel ilo por konsciigi Eŭropanojn pri lingvaj problemoj en Eŭropa Unio. Dum la Konferenco pri estonteco de Eŭropo (2021-2022), EDE bone laboris kun EEU, la eŭropa komisiono de UEA kaj aliaj grupoj por antaŭenigi Esperanton kaj lingvajn problemojn. Malfeliĉe, friponaĵoj ne ebligis videbligi la proponojn en finaj fazoj de la Konferenco, sed feliĉe la kunlaboro daŭras. Li parolis pri esploroj Eŭrobarometro, kiuj montras ke publika opinio estas tre malsimila en la diversaj landoj, kaj tio streĉas rilatojn inter la ŝtatoj. Fine estis priskribo de la retejo europokune.eu, kiu enhavas tradukojn de gravaj dokumentojn en ĉiuj oficialaj lingvoj de EU. La lumbildoj de tiu prezento estas haveblaj ĉe http://europokune.eu/data/medias/2023/uktorino/prezede_uk_torino.odp. Poste estis diskuto pri malsamaj opinioj pri nuklea energio, ĉefe inter Germanio kaj Francio, kaj pri neutileco de frua instruado de fremdaj lingvoj. La franca sekcio de Eŭropo Demokratio Esperanto diris ke ĝi planas partopreni la eŭropan baloton por elekti la parlamentanojn. Tiu baloto okazos dum junio 2024. Pri la sekcio de Germanio, ankoraù ne certas ke tio povas okazi ĉar la membroj de EDE-Ge komencas rikolti la subtenojn. Ĉiu germano kiu deziras subteni tiun agadon povas kontakti la respondeculojn kaj kolekti ĉirkaù li/ŝi la subskribojn. Eĉ se nuntempe la retejo e-d-e.org kaj e-d-e.fr ne funkcias, tamen la retadreso kontakto@e-d-e.org kaj contact@e-d-e.fr estas uzeblaj por kontakti aktivulojn de EDE.

*Pierre Dieumegard KN 643*

### Migrantoj, interkulturaj demandoj

Tradicia programero de la UK "Tago de Lernado" okazis mardon, la 31-an de aŭgusto 2023 kun la ĉeftemo "La mondo en mia klaso: pripensante pri enmigrintoj". La programon de la Tago nome de ILEI kunordigis Marija Belošević. Krom la partoprenantaro en la salono, pere de ZOOM povis partopreni aliaj interesuloj, inter kiuj plej multo estis ĝuste E-instruistoj kaj E-instrauantoj. Ĉe la komenco la partoprenantaron salutis la prezidanto de UEA, Duncan Chaters, kaj la prezidanto de ILEI Ahmad Manduhi. Entute dum la seshora programo estis prezentitaj ok prelegoj. Ĉiuj prelegantoj laŭ sia fako, sed same laŭ siaj propraj spertoj povis prezenti konkretajn ekzemplojn. La enkondukan prelegon prezentis Mireille Grosjean (Svislando) kiu unue prezentis bazajn konsiderojn pri la situacio de enmigrintoj, ia tipologio. Poste ŝi subsrekis, ke la motoro de lernado estas la motivado. Kaj la motivado estas influita de la vivspertoj, de la vivkondiĉoj, de la pasinteco kaj de la ebla futuro, la motivado estas influita, tio estas fortigita aŭ detruita. Vicente Manzano-Arrondo, Viko (Hispanio) en sia prelego titolita "Kion mi ŝatintus. Esploro pri la baza lernejo laŭ enmigrintoj" prezentis propajn spertojn el la lernejo kiun vizitas lia filino. Ankaŭ li tuŝis la demandon de la publikaj kaj privataj lernejoj kaj atentigis avantaĵojn de la publikaj lernejoj. Proprajn spertojn kiel memenmigrinto al Kanado prezentis Zdravka Metz. Ŝi substrekis ankaŭ grandan rolon de Esperanto mem. Kaj krome, ŝi atentigis pri la "kanada modelo", t.e. volontulado, kaj prezentis plurajn ekzemplojn kie ankaŭ ŝi volontulis, kaj tiel transdonis spertojn al la ĝusvenintaj enmigrantoj. Dum la prelego "Parolu france en Francio" Renée Triolle (Francio) atentigis de la postuloj de la eduksistemo. Monika Molnar (Svislando) prezentis "La mondon en sia klaso", t.e. modela instruado al la lernantoj de la lernejo "Grande Ouerse" en La Chaŭ-de-Fonds. La specialaj gastoj dum la prelego estis duono "Kajto": la kialo vere aparta. Krom ke la lernantoj sxatas kantojn de Kajto, al Kajto placxis poemojn kiujn verkis la lernantoj kaj ili decidis komponi muzikon por ili kiun la partoprenantaro kun ĝojo aŭskultis. Grazynka Szubryczyńska (Pollando) trafe kontribuis al la kongresa temo per la prelego "Rifuĝintoj el Ukrainio en pola bazlernejo". Etuloj de la infanĝardeno en Torun iĝis vere bona modelo kiel akcepti samaĝulojn el Ukrainio. Krome, ankaŭ ŝi montris siajn pedagogiajn lertecojn kiuj helpis ke ili sentu sin sekuraj kaj bonvenaj. Pri Esperanto-instruado en Burundo parolis Patrick Manirakiza. La prelego estis ne nur la bona okazo aŭdi novajn spertojn, sed same vidi konkretajn bezonojn por pli efika agado instrukampe. Temon pri multlingvismo trafe prezentis Monique Arnaud (Francio. La bazo de la prelego estis tri fabloj de Jean de La Fontaine en 30 lingvoj inter ili ...esperanto! Ni aldonu, ke ses horan programon sekvis ankaŭ interesuloj el deko da landoj danke al la zoom-ligilo. Fakte, ne nur sekvis, sed ankaŭ aktive partoprenis la diskuton.

*Marija Belošević, kn 117*